
# VEGETARA ☆ REVUO



632
1.7.1984

Provnumero. Provnumero.

Karaj gesamideanoj en la tuta mondo Jen venas al vi la unua nemero de "VEGETARA REVUO". Mi esperas, ke vi ĝin afable akceptos, eĉ ĝi estas nur malgranda kaj ne tre bela. Sed vi certe scias pri la manko de papero. Ni esperu, ke tio baldaŭ pli boniĝos kaj promesas liveri al vi kiel eble plej baldaŭ pli grandan eble presitan Revuon. Sed ĉu ni povos ĝin baldaU presigi dependas de kaj gesamideanoj ĉie, ĉar antaŭ tio povos efektiviĝi, ni devos havi multajn abonantojn. Mi bezonos kun laborantojn, kiuj havigos al la Revuo abonantojn. Mi bezonos kunlaborantojn, kiuj skribos kaj verkos al la Revuo artikoletojn kaj trovos novaĵojn koncernante la vegetaran vivon en ĉiuj kaj ĉiaj regionoj.

---

La abonprezo. Bedaŭrinde mi konstatis, ke estas necese fiksi la abonprezon je 5 svedaj kr. aŭ egalvaloro. En la unua momento mi kalkulis pli malaltan sumon. Al tiuj, kiuj jam pagis, mi petas pardonon kaj -krompagon. Mi supozas, ke la Vegetaroj vivas sufiĉe malmultekoste ne elspezante multe da mono por nenecesaj aferoj, kaj tial ili havas monon por - propra gazeto.

Multaj homoj surtere devas nun ĉiutage oferi grandan monsumon por siaj "bezonaĵoj" - tabako - alkoholo kafo - teo k. t. p.. Ofte la porciigitaj varoj ne sufiĉe ĉeestas, kaj tiam ili iras al la nigra borso. Tial ni Vegetaroj povas oferi monon al aferoj, kiujn ni pli alte taksas ol tiuj venenigaj aĵoj, kaj unu el la aferoj al kiuj ni nepre devos oferi monon, energion kaj tempon estas, laŭ mia opinio, forta vegetara gazeto, ĉar per ĝi ni povos helpi unu al la alia trovi vojon al pli bela kaj sana vivo surtere.

La redakcio ĉiam klopodos helpi kaj subteni vin en via batalo por atingi tiun ĉi celon. Se ĉiuj Vegetaroj esperantistaj unuiĝos al tiu laboro, ni fortigos kaj la esperantan movadon kaj la vegetaran. Ĉu vi povos trovi pli belan celon, al kiu ni iru. Se la mondo iam fariĝu paca loko por la homaro, la du movadoj devos ludi tre grandan rolon en la batalo al tiu celo.

Karaj gesamideanoj, ĉu vi deziras esti pasiva, aŭ ĉu vi deziras havi grandan rolon???

Internacia Vegetara Kanto.

En mondo malĝoja,
en mond' kun envi'
ni celas al pli bona stato,
ni celas al vivo sen malharmoni'
en kiu nur regas kompato.
Kompato kun ĉio vivanta sur ter',
ĉar ĉio ja rajtas vivadon.
La best' en kamparo,
la bird' en aer'
bezonas la homan ŝirmadon.

Nur greno kaj nuksoj
kaj ĉia fruktar'
servadas por nia nutraĵo,
ne peltojn kaj plumojn
de best' kaj birdar'
ni uzas por nia veŝtaĵo.
Ni volas restadi
ĉe monto kaj mar'
kaj vivi en lumo kaj sano
alporti feliĉon al nia fratar',
jen celo de Vegetarano.

Ĝin verkis

Catharina J. Roskes-Dirksen, Hago.

La kanton sendis al ni samideano s-ro Jeheskel Dorn en Plaestino.

---

Se, vi, kara leganto, havas ion interesan, bonvolu sendi tion al la redakcio, ĉion bonan mi ak=ceptos kun danko.

Multaj certe ne komprenas, ke la Revuo ne venis jam antaŭ longa tempo. La kaŭzoj estas multaj kaj diversaj.

Mi scias, ke vi ĉiuj pli ŝa=tus presitan revuon. Sed ĉu vi faris kalkulon pri tio. Por ape=rigi tian gazeton mi devos havi minimume 500 abonantojn en la mo[...] do kaj ĝi kostus almenaŭ la tri[...] lan prezon de duplikita revuo. I[...] 10 - 12 svedajn kronojn. Ĝis ho[...] aŭ sin anoncis 50 gesamideanoj [...] kiel abonontoj sed por peti prov[...] nimeron. Espereble ili ĉiuj post [...] fariĝos abonantoj.

Ni do devos labori por varbi [...] vajn abonantojn por la Revuo, ka[...] kiam pliboniĝos la paperporcioj [...] la abonantaro pligrandiĝos ni po[...] komenci esploron por eldoni pres[...] tan revuon.

Karaj gesamideanoj' Vi mem de[...] das pri tio, vi mem povos fiksi [...] tempon je kiu ni povos aperigi [...] an revuon. Ĉu ne ekzistas sufiĉe [...] Vegetaraj Esperantistoj en la tu[...] mondo por starigi Vegetaran Rev[...]

Jes, mi tion kredas. Baldaŭ m[...] triĝos, ĉu mi malpravas aŭ ne.

Ge-sam-ide-anoj en la tuta mo[...] Montru la Revuon al ĉiuj Vegeta[...] mi volonte sendos provnumeron a[...] uj, kiuj petas tion.

Ne forgesu sendi artikoleton [...] la Revuo, se eble maŝinskribita [...] kaj ĉiujn novaĵojn de hejma mov[...] kaj gazetaro vi ankaŭ sendu.

---

Tiuj, kiuj ne rekte povos pag[...] abonprezon pro la valuta afero, [...] vos aliĝi kaj pagi je la centra [...] ficejo de U.E.A. en Londono, ĉa[...] oni afable promesis akcepti abo[...] tojn por la Revuo.

La pago valoras kiel jam anon[...] ta por unu jaro.

## O V O J !!!

Mi ĵus legis en gazeto, ke rusa profesoro post longa esplorado venis al tiu rezulto, ke ovoj ne nur estas nebona manĝaĵo por homoj sed ke la ovoj estas eĉ tre danĝeraj por la homa organismo.

Estas tre interese tion aŭdi de scienculo, ĉar tion diris jam antaŭ multaj jaroj la spertuloj de la vegetara movado, sed tiam ridis la ortodoksaj kuracistoj nur. La rusa profesoro, kiu laŭ la gazeto iros al Ameriko por prelegi antaŭ la amerikaj scienculoj pri siaj esploradoj, ankaŭ diris, ke tio, ke la homoj ordinare atingas nur 70 jarojn estas nur pro malsanoj. La vera aĝo, kiun devus atingi la ordinara homo, estas 150 jaroj.

Ŝajnas eble al multaj, ke la profesoro kalkulas tro alte fiksante la aĝon je 150, sed ni tamen devos pravigi lin en tio, ke la homoj povus pli longe vivi ol nun, se ili vivus pli prudente.

---

## Favoroj - aŭ ne?

La redakcio tre interesiĝas pri tio, ĉu la Vegetaroj en via lando estas favorataj iel ajn de la registaro. Por ke vi pli bone komprenu, kion mi celas, mi povos informi vin pri la jena fakto:

En Danlando ni Vegetaroj ekhavis malgrandan favoron. Vi eble scias, ke nia lando estas granda butérproduktanto. Sed la butero ja estas valora ne nur por la enlanda bezono, sed ankaŭ por la eksporto, kaj ĉar eksporto portas fremdan monon al la lando, oni deziras eksporti kiel eble plej multe. Tial oni komencis kiel eble plej frue en la postmilita tempo fari margarinon. En margarino estas oleo, kaj ĉar oni uzas la oleon de balenoj, la vegetaroj ĝin malŝatas. La hejma vegetara movado tiam atentigis la registaron pri tio kaj petis, ke oni permesu al fabriko fari margarinon nur el plantooleo, kaj oni vere tion permesis. Kaj nun la plej multaj Vegetaroj manĝas tute ne buteron sed margarinon - pli malmultekostan kaj pli bonan manĝaĵon.

Kiel estas ĉe vi? Ĉu vi ĝuas favorojn? Skribu pri tio al ni.

---

## Novaĵoj!

En hejma gazeto mi trovis artikoleton koncernante la uzadon de nervo medicino. La ĵurnalisto intervjuis apotekiston, kiu diris, ke la vendado de nervomedicino multe pligrandiĝis en la postmilita tempo. Jes oni fakte parolas pri rekordvendado, kaj kompreneble oni ŝuldigas la militon pri tio. Ĉu ĝi sole havas la kulpon?

---

## Frandaĵo!!!

Laŭ iu gazeto femuro de rano estas tre ŝatata frandaĵo en Ameriko. Kaj de la lando Kubao oni grandamase eksportas ranojn al U.S.A.. En la jaro 1945 oni aĉetis ranojn por ĉirkaŭ 1.000 dolaroj.

Bonan apetiton!

## Mondkongreso!

La mondkongreso de la vegetara asocio okazos ĉisomere en Londono. Tio komprenebl estas ĝojiga afero por tiuj, kiuj havos okazon ĝin partopreni. Tamen oni ĉerpis guton da absinto en la krucon de nia ĝojo. Nia samlandano s-ro Ekerod publikigis al ĉitiea gazeto post lia hejmenveno de la prepara kunveno, ke la angla lingvo estos la lingvo de la kongreso. Povus esti interese ekscii, kiu decidis pri tio. Por ni Esperantistoj tio estas malĝojiga afero, kaj ŝajnas al ni, ke estas malbona servo kion faros kaj kontraŭ la vegetara movado kaj kontraŭ la esperanta. Mi ne scias, ĉu multaj esperantistoj partoprenos la kongreson, sed ŝajnas tamen al mi, ke ni devas protesti kontraŭ tiu decido. Se oni estus decidinta, ke Esperanto estu la ĉefa lingvo de la kongreso kaj aliaj lingvoj estu permesataj, oni estus agintaj saĝe, laŭ mia opinio. Ĉu la estraranoj de la vegetara movado forgesis, ke ekzistas internacia helplingvo, kiu estas uzata en la tuta mondo? Se jes, oni devos atentigi ilin pri tio, ĉu ne?

---

Gesinjoroj Børge Hansen, Raadmandsgade 46 B, KØBENHAVN N, Danlando deziras korespondi kun gevegetaroj en la tuta mondo en Esperanto.

## La Revuo

nur post multa penado aperis. Tamen min tre ĝojis la multaj let roj kaj kartoj, kiuj alvenis tien de ĉiuj anguloj de la mondo.

Sed post la ricevo de tiu ĉi n mero, la provnumero, mi petas vin kiel eble plej baldaŭ sciigi al m ĉu vi deziras aboni la REVUON.

Mi ankaŭ tre ŝatus ricevi prop nojn pri la Revuo kaj plendojn ka eĉ laŭdon.

Eble vi, kara leganto, scias e lecon por ĝin presi ie ajn, eble povos trovi pli bonan redaktoron.

Se vi estas kontenta pri la ko menco skribu tion, se ne, skribu al vi ne estas kontenta. Unue kaj e ne forgesi skribi.

---


VEGETARA REVUO.

Administracio: St. Blichersvej 43
Aabyhøj, Danlando

Redaktoro: Christian Hougaard
(sama adreso)

Abono: 5 svedaj kronoj jare
( 12 numeroj)


Vegetaroj en tutmondo aliĝu kaj varbu kaj propagandu ĉie kaj ĉiel. Akceptejoj aperos ĉie iom post iom

Sed karaj legantoj ne atendu ĝi la Revuo estos mortonta, ne prokrastu vian propran aliĝon ne forgesu instigu aliajn gesamideanojn al abono.

Kaj fine - kunlaborantojn mi ege b zonas - ankaŭ vin mi atendas.